View metadata, citation and similar papers at core.ac.uk
brought to you by CORE
provided by Jagiellonian Univeristy Repository

# Prezento de la scienca agado de prof. d-ro habil. Stanislao Stachowski

Stanislao Stachowski naskiĝis la 21-an de oktobro 1930 en Jeziora apud Grodno. Tie li frekventis, komence polan, poste bjelorusan bazlernejojn, kaj dum la dua mondmilito li lernis en konspiraj klasoj. Post la milito la estonta lingvisto translokiĝis kun siaj gepatroj al Tomaszów Mazowiecki, kie, en 1851, li finis mezlernejon.

La ligoj de prof. Stanislao Stachowski kun Jagelona Universitato datas ekde la jaro 1951-a, en kiu li ekstudis serbo-kroatan filologion. Jam tiam li montris intereson pri lingvoj aliaj ol la slavaj, tial li kromstudis turkan lingvistikon. La magistriga laboraĵo de la estonta profesoro, pri fremddevenaj sufiksoj en la serbo-kroata lingvo, estis publikigita en 1961. La grandan intereson pri la publikaĵo pruvas tri recenzoj, aperintaj en Parizo, Budapeŝto kaj Skopjo.

Tuj post magistriĝo Stanislao Stachowski eklaboris en la Katedro de Slava Filologio kiel, laŭvice, anstataŭanto de asistanto, asistanto kaj altasistanto.

La doktorigan disertaĵon, preparatan komence sub gvido de prof. d-ro Tadeo Lehr-Spławiński kaj post ties morto direktatan de prof. d-ro Stanislao Urbańczyk, li defendis en 1967. Jam laŭ la titolo de la disertaĵo *Język górnołużycki w „De originibus linguae Sorabicae" A. Frencla (1693–1696)* (*La soraba lingvo en „De originibus linguae Sorabicae" de A. Frencel (1693–1696)*) videblas, ke la esplorintereso de la Jubileanto direktiĝis al alia slava lingvo ol tiu, kiu estis la objekto de lia universitata studado.

Kvin jarojn poste Stanislao Stachowski finverkis sian habilitigan disertaĵon, kiu estis publikigita la postan jaron, t.e. en 1973. Ĝi koncernis ne nur

la slavan lingvistikon, sed ankaŭ la turkan: la titolo de la laboraĵo estis *Fonetyka zapożyczeń osmańsko-tureckich w języku serbsko-chorwackim* (*La fonetiko de la osmanturkaj pruntaĵoj en la serba-kroata lingvo*). Tiu tute nova kaj malsama esplorintereso faris, ke la tiama habilita doktoro estis nomumita docento (en 1974) kaj transigita al la Instituto de Orienta Filologio (Sekcio de Turkologio), kie li laboris ĝis sia emeritiĝo, en 2000.

Surbaze de tri partoj de la jam tute dediĉita al orientaj studoj libro, titolita *Studien über die arabischen Lehnwörter im Osmanisch-Türkischen* (*Studoj pri la arabaj leksikaj pruntaĵoj en la osmanturka lingvo*) (1975, 1977, 1978), de la verko *Słownik górnołużycki Abrahama Frencla (1693–1699)* (*Soraba vortaro de Abraham Frencel (1693–1699)*), publikigita en 1978, kaj de multnombraj artikoloj Stanislao Stachowski iĝis, en 1983, titola profesoro pri humanistiko. Enpostenigo de Stanislao Stachowski kiel ordinara profesoro de Jagelona Universitato, en 1992, kronis lian sciencan aktivadon.

Jam la cititaj kelkaj laboraĵoj, kiuj estis bazo por la avancado de Stanislao Stachowski, montras lian vastan esplorkampon. Tamen, rigardante la verkaron de la Jubileanto eblas rimarki, ke liaj interesoj koncernas tri terenojn de la lingvistiko: la slavan, turkan kaj balkanan. Ja, kvankam ili diferencas, kunligas ilin leksikologia aliro, precipe esplorado de rilatoj inter leksikunuoj apartenantaj al diversaj lingvaj grupoj. Kiel montras la troviĝanta en la sekvaj paĝoj listo de la laboraĵoj de prof. Stanislao Stachowski, la profesoro dediĉis al tiuj temoj 19 librojn kaj ĉ. 70 artikolojn, recenzojn kaj malpli grandajn verkojn. La ecoj de la tuta verkaro de prof. Stanislao Stachowski estas granda precizeco, precipe pri fontoj de la priskribata leksiko, elstara metodologia ilaro kaj trafeco de la proponataj solvoj.

Prof. Stanislao Stachowski plurfoje restadis eksterlande, i.a. realigante 10-monatan sciencan staĝon en Zagrebo (1959/60), kaj malpli longajn studrestadojn en Prago, Budapeŝto kaj Moskvo. Li faris ankaŭ malpli longajn prelegvojaĝojn al, ekz., Budisino, Skopjo, Minsko, Sofio, Vilno, Peĉo, Segedo. Lia prelegado estis tre bone akceptita. Li partoprenis ankaŭ multajn landajn kaj eksterlandajn konferencojn.

Prof. Stanislao Stachowski estas membro de pluraj sciencaj komisionoj: la Komisiono pri Slavologio de la filio de la Pola Scienc-Akademio (PAN) en Krakovo ekde 1969, kaj ekde 1996 – Honora Membro de tiu filio; la Lingvistika Komisiono de la sama filio, ankaŭ ekde 1969; la Orientstuda Komisiono de la filio de la Pola Scienc-Akademio en Krakovo ekde 1969, kaj en la jaroj 1987–1989 ties prezidanto. En 1984 li iĝis membro de la Komitato de Orient-Sciencoj de la Pola Scienc-Akademio, en 1987–1989

li apartenis al la Prezidantaro de la komitato kaj en 1996–1998 li estis ties vic-prezidanto. En 1990 Stanislao Stachowski membriĝis en la Societas Uralo-Altaica.

Priparolante la sciencan aktivadon de la profesoro, oni ne prisilentu lian ĉefredaktadon de la revuoj *Folia Orientalia*, ekde 1987; *Prace Językoznawcze* (*Lingvistikaj Laboraĵoj*) – parto de *Zeszyty Naukowe* (*Sciencaj Kajeroj*) de Jagelona Universitato, ekde 1988; la serio *Studia Turcologica Cracoviensia*, kies ne nur ĉefredaktoro, sed ankaŭ fondinto li estas.

La sfero de la kursoj, kiujn prof. Stanislao Stachowski ofertis al la studentaro de Jagelona Universitato estas impona: ĝi koncernas la historian kaj komparan lingvistikon de lingvoj slavaj, tjurkaj, de la rumana, ankaŭ de la hungara. La kursoj estis destinitaj al studentoj de diversaj filologioj: slava, pola, rusa, turka, rumana kaj hungara. Rezulto de tiuj diversspecaj okupoj estis magistrigo de pli ol 40 studentoj ne nur de turkologio, sed ankaŭ de hungarologio, kio – konsiderante la specifecon de la studoj – estas granda nombro. La kvar doktorigaj disertaĵoj verkitaj sub lia gvido koncernas la turkan lingvistikon. Se temas pri formado de profesiuloj, menciindas ankaŭ la partopreno de la profesoro en kelkaj doktorigoj kaj habilitigoj kiel recenzanto.

La prezentitaj imponaj sciencaj kaj didaktikaj atingoj permesas konsideri la Jubileanton kiel grandan erudiciulon kaj eminentan lingviston, kio estis rimarkita de landaj aŭtoritatoj kaj honorigita per multaj premioj: tri Triagradaj Premioj de la Ministro de Edukado kaj Superaj Lernejoj (1967, 1974 kaj 1979), du premioj de la Rektoro de Jagelona Universitato (1991 kaj 1995) kaj du distingoj: La Ora Kruco por Meritoj (1976) kaj la Kavalira Kruco de la Ordeno de Renaskiĝo de Pollando (1986).

Malgraŭ la granda aktiveco en la scienca kaj didaktika kampoj prof. Stanislao Stachowski trovis tempon ankaŭ por universitataj administraj taskoj. Dufoje, dum 1981–1984 kaj 1989–1991, li estis vic-direktoro de la Instituto de Orienta Filologio, kaj dum 1991–1994 ties direktoro. Krome, en 1987 li estis komisiita de la Rektoro de Jagelona Universitato formi memstaran Katedron de Hungara Filologio, kiun li estris dum 1989–1991. Sendube, la sciencaj, didaktikaj kaj organizaj atingoj envicigas prof. Stanislao Stachowski inter la plej elstarajn polajn lingvistojn, kies alta pozicio estas rekonata ne nur en Pollando, sed ankaŭ eksterlande.

Elżbieta Mańczak-Wohlfeld
(Tradukis Maria Majerczak)
Krakovo, 2010